

LA ESTONTECO DE CED

Provizora Raporto
20 marto, 1975

de Jonathan Pool, Aganta Direktoro

Enkonduko

En aŭgusto, 1974, la Estraro de UEA nomis min Aganta Direktoro de CED kun la ĉefa tasko, rekomendi al ĝi pri ties estonteco. Ĝi-sube estas mia provizora rekomendaro. Ĝi profitas el opinioj esprimitaj de multaj UEA-anoj dum kelkaj monatoj de konsultigado. Nature, la opinioj estis ofte kontraŭaj unu al aliaj; ĉi tiu raporto adoptas iujn, malakceptas aliajn kaj aldonas mem ankoraŭ plurajn. Mi deziras ricevi reagojn pri ĉi tiu rekomendaro kaj de la Estraro de UEA kaj de interesataj organizoj kaj unuopuloj. En junio, konsiderinte la reagojn, mi preparos finan raporton. Dume, la legantoj bonvolu memori, ke la raporto estas provizora kaj ne estas kontrolita aŭ aprobita de iu ajn decidpova instanco de UEA.

La raporto unue resumas, kio CED estis ĝis nun. Poste estas analizo de la bezonoj, kiujn CED povus estontece kontentigi. Fine estas indikoj pri la manieroj, laŭ kiuj ĝi povus tion fari.

La estinteco de CED

"Estas jam tempo", kiel skribis Ivo Lapenna, "ke oni komencu nomi la aferojn laŭ iliaj veraj nomoj." La Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) neniam estis tio, kion indikas ĝia nomo nuna, nek tio, kion indikas ĝia malpli pretendema eksnomo, Centro de Esploro kaj Dokumentado (de Universala Esperanto-Asocio). Ĝi ĉiam fakte estis centro de dokumentado, informado kaj argumentado por la Esperanto-movado. Kun tri gravaj esceptoj, ĝi ne okupiĝis pri esplorado, nek pri la lingvaj problemoj de la mondo generale; male, ĝi ignoris sugestojn, de Artur Bormann kaj aliaj, ke ĝi tion faru. La esceptoj estas: (1) la kolekto de ĵurnalaj eltrancaĵoj ktp en la CED-arkivo, kiu inkluzivas ankaŭ erojn pri lingvaj problemoj generale; (2) la projekto pri Esperanto en perspektivo kaj la Enciklopedio de Esperanto, kiu inkluzivas ankaŭ originalan esploron; kaj (3) la scienca revuo La monda lingvo-problemo, eldonata ekde 1969, kiu estas forumo por esplorrezultoj en la tuta lingvoproblema kampo. Sed kiel indikas liaj kontribuadoj al (2) kaj liaj rimarkigoj en la jarraportoj de CED pri la dezirinda enhavo de (3), la Honorofica Direktoro volis utiliĝi ankaŭ tiujn kiel rektajn argumentilojn.

Mankas gtestaĵoj, ke sciencaj institucioj konsideris CED unu el si, aŭ ke CED gvis ekstermovadan prestigon aŭ fidon, aŭ ke tiuj kun lingvaj problemoj konsultis CED por trovi solvojn, aŭ ke iu traktis CED-Dokumentojn kiel ion alian ol informilojn de UEA. La sola projekto de CED, kiu sukcesis en la scienca

mondo, estis LMLP.

Krom sia ĉefokupiĝo pri Esperanto-informado. CED havis alian esencan econ: la koncentrigon de laborado kaj gvidado. Dum 23 jaroj Ivo Lapenna mem, kiel Honorofica Direktoro, faris la plejmulton de la laboro de CED. Li delegis taskojn al ĉirkaŭ 70 Kunlaborantoj, sed la kontrolsliparo pri Kunlaborantoj montris, ke nur malgranda parto de ili restis aktiva ĝis la 1970-jaroj. Krome, la delegitaj taskoj estis preskaŭ ĉiam rutinaĵoj (ekz. tradukado, statistikado). Sole Lapenna faris la plejmulton de la redaktado, interpretado, oficiala korespondado kaj decidado. La du plej gravaj esceptoj estas la Enciklopedio de Esperanto kaj LMLP.

La kvalito de la laboro de CED estis ĝenerale alta, almenaŭ la statistika laboro. CED penis prezenti la faktojn pri la Esperanto-movado per siaj Dokumentoj, sen troigoj, malgraŭ tio, ke la objektivaj faktoj estis malfacile kolekteblaj. La redaktado de la Enciklopedio kaj de LMLP estis tre kompetenta. CED sagace kulturis rilatojn kun aliaj organizoj. Fiŝe, CED faris sian abundan laboron kun minimumo de financa ŝarĝo por UEA, aparte pro la senpagaj servoj de Lapenna. Escepte, LMLP kostis multe al UEA, eble pli multe ol necese.

La nuntempaj kaj estontaj bezonoj

La Esperanto-movado havas antaŭ ĉio unu fundamentan celon: ke relative facile legnebla kaj relative nediskriminacia planlingvo ekestu la ĝenerale agnoskata kaj uzata lingvo de internacia komunikado. Kun tiu celo, la movado sekvas jam delonge bazan strategion duopan: (1) kiel eble plej disvastigi la sciopovon kaj uzon kaj helpi la serantikan ricigon de la plej sukcesa kaj populara tia lingvo, Esperanto; kaj (2) samtempe gajni por sia starpunkto kiel eble plej multajn oficialajn kaj privatajn instancojn, organizojn, grupojn kaj unuopulojn, kiuj povus partopreni en la internacia lingvopolitika procezo.

Sen diskuti pli detale la taktikojn de tiu strategio, oni povas fari la jenajn konkludojn:

(1) La movadancoj ĝenerale konsentas, ke la duopa strategio estas la plej bona ĝis nun elpensita.

(2) La rezultoj ambaŭflanke estas esperigaj, sed ankoraŭ nekontentigaj.

Koncerne la duan konkludon, la nombro kaj influo de la uzantoj kaj simpatiantoj de Esperanto estas ankoraŭ malgrandaj. Negativaj opinioj kaj nescio pri Esperanto ankoraŭ abundas. Nur manpleno da homoj (ekz. Deseriev) pensas pri la tuta mondo kiel unu lingva sistemo, kies procezoj povus kaj devus esti plane regulataj. Aliflanke, oni okupigas pri lingvoproblemoj pli ol iam antaŭe: lingvoedukado, lingvaj minoritatoj, lingvobariloj inter rasoj kaj klasoj, sociolingvistiko, lingvoplanado ktp. farigis furoraj fakoj. Se tiu konscio pri lingvoproblemoj pliprofundigos per ekkono de la tutmondaj interligoj inter tiuj problemoj, ni povas atendi, ke la demando de internacia lingvo plimalpli subite aktualigos--ne nur fakte,

sed ankaŭ laŭ publikaj perceptoj.

Por pli sukcese apliki la duopan strategion en ĉi tiuj kondiĉoj, necesos multaj aferoj: laboro, mono, mendisciplino, persistemo kaj takto estas kelkaj. Sed unu el la plej gravaj rilatas rekte al ĉi tiu raporto: scio. La nivelo de scio estas nepre plialtigenda.

1. La tuta mondo devas ekscii multe pli pri la lingva situacio internacia, pri ĝiaj kaŭzoj, pri ĝiaj sekvoj kaj pri la eblecoj de interveno por ŝanĝi la situacion.

2. La mondo devas multe pli bone ekscii la faktojn pri Esperanto.

3. La membroj de la Esperanto-movado devas ekscii ankoraŭ multe pli pri la sciencaj faktoj, kiuj rekte tusas Esperanton.

4. La membroj devas ekscii ankoraŭ multe pli granda aro da aferoj, kiuj helpus al ili plibonigi sian laboron por Esperanto.

Por ni, la unuaj du bezonoj estas jam delonge konataj. Esperantistoj ofte asertas, ke nescio kaj misciĝo pri la lingvoproblemo kaj Esperanto kontribuas al la daŭra rifuzo, trakti Esperanton serioze. Sed la tria kaj kvara sci-bezonoj, tiuj de la esperantistoj mem, estas apenaŭ agnoskataj inter la vasta membraro. Ili ĝenerale supozas, ke ili mem scias tion, kion oni devas scii pri la lingvoproblemo kaj ĝia solvo; ili konceptas la taskon jene: doni tiun scion al la mondo.

Tiu konceptiĝo estas natŭra en iu ajn movado. Ĝi estas des pli komprenebla ĉe ni, ĉar la gvidantoj de la Esperanto-movado dum jaroj instigis ĝin per retorikado pri la "perfekteco" de Esperanto, kies supereco kiel solvo de "la" monda lingvo-problemo estas nekontestebla "fakto", kiun aliaj "ignoras", "misprezantas" au kaŝas per "blufoj". Tiu sinteno de la gvidantoj certe komfortigis plurajn esperantistojn, sed kontribuis al naiva kredo inter ili pri la simpleco de la lingvo-problemo kaj de ties solvo.

Unu sekvo de ĉi tio estis preskaŭ kompleta dispartiĝo, eĉ pli psike ol fakte, inter esperantistoj kaj ekspertoj. Ekspertoj en lingvaj fakoj ne interesiĝis multe pri Esperanto, parte (oni devas supozi) ĉar esperantistoj kutime prezentis ĝin kiel aferon tro simplan por esti interesa. Kaj esperantistoj ne fariĝis mem ekspertoj en tiaj fakoj, kun maloftaj esceptoj. Ili atendis, ke la homoj kun fakaj kapabloj malkovru Esperanton, anstataŭ ke la homoj, kiuj malkovris Esperanton, akiru fakajn kapablojn. Esperantistoj kutime evitis ne nur fakojn, sed ĉiajn mediojn, projektojn ktp, kiuj postulus de ili kunlaboron kun la apogantoj de, au personan okupiĝon pri, aliaj eblaj solvoj por lingvaj problemoj krom Esperanto. Ili ankaŭ evitis tian profundan konatiĝon kun lingvaj problemoj, kia povus dubigi ilin pri: (1) la aplikebleco de Esperanto; (2) la solvebleco de la problemoj entute; au (3) la daŭra akriĝo de la problemoj. Apenaŭ necesas rimarkigi, kian efikon tiu ignoraĵo havis sur la sukceso de informa laboro, precipe en tiuj sufiĉe oftaj kazoj, kiam laikaj movadanoj provis informi en kleraj medioj.

Sole pri Esperanto mem la gvidantoj senĉese instigis

(ekz. per la Internacia Ekzameno) ekspertigon de la membraro. Sed la malekvilibro de tiu instigado estis granda. La scioj estis profundaj pri ĉio movada, ekde Zamenhof ĝis la nombro de Zamenhof-stratoj, kaj ankaŭ pri la literaturo de Esperanto. Sed pri Esperanto kiel lingva fenomeno ec ĝiaj scipovantoj scias malmulton. Nur en tia stato (plus stato de lingvistika naiveco) Esperanto en Perspektivo povis pretendi, ke "La gramatiko konsistas el 16 mallongaj bazaj reguloj"

Dum jaroj la gvidantoj de la movado pledis, ke ekspertoj interesiĝu pri Esperanto. Dum jaroj ili ankaŭ postulis, ke la membroj fariĝu pli profesiecaj rilate al informado (Frostavallen ktp). Sed samtempe la gvidantoj ne nur toleris, sed ec diris aferojn, kiuj fusigis la informadon kaj sajnigis Esperanton esti neinteresa kiel serioza studobjekto, escepte en eventuala studo pri utopiismoj. Ŝajne la gvidantaro neniam vidis, ke ĝi pasas sur sian propran piedon.

Tio kondukas min al kelkaj bazaj principoj.

(1) La mondo havas seriozan lingvo-problemon, pri kiu oni devas studi, ne ludi. Se oni diras, ke oni havas solvon por tiu problemo, oni metas sin en pozicion de respondeco. Tiu respondeco postulas, ke oni ne dediĉu ĉiujn fortojn al reklamado pri la solvo, ĝis oni mem estas sufiĉe certa, ke oni diras la veron. Kaj oni ne povas esti respondece certa pri la solvo de iu problemo se oni ne profunde konas du aferojn:

(a) la problemon kaj (b) la proponatan solvon.

(2) Krom tio, oni bezonas multajn aliajn sciojn por efike persvadi al la mondo, ke ĝi faru ion. Tiuj inkluzivas ĉion ekde grafikaj kompostmetodoj ĝis ministeriaj decidprocedoj. Debatoj en la movado inter malsamaj strategioj de agado ilustras nian bezonon de tiaj scioj. Mi nomos la aferojn en principo (1) ci-supre "kernaj" scioj kaj tiun ĉi duan specon "rilataj" scioj.

(3) La necesaj scioj de ambaŭ specoj ne povas esti sekretoj de la movada elito, pro tri kialoj. Unue, la membroj bezonas multajn kernajn sciojn por mem decidigi pri Esperanto, ĝenerau se ili intencas apogi ĝian tutmondan adoptigon. Due, ce ĉiu nivelo de movada laboro la membroj devas diskonigi aŭ apliki sciojn de ambaŭ specoj por sukcesi. Tria, la kernaj fakoj estas tiel kompleksaj, kaj la rilataj fakoj estas tiel multaj, ke oni neniam atingos kontentigan nivelon de scioj sen kunlaborado de samtempe centoj, kaj tra la jaroj miloj, da personoj. En tiu ĉi rilato, la Esperanto-movado similas al preskaŭ ĉiuj influgrupoj: ilin daŭre frustras la manko de sufiĉaj informoj por efike labori.

La baza rekomendo por CED

Tio donas la bazon por la ĉefa rekomendo de ĉi tiu raporto. Oni ne renomu CED konforme al ĝia laboro. Oni ja reorganizu CED por fari laboron konforman al ĝia nomo. Esperanto kaj la Esperanto-movado bezonas efektivan centron de esploro kaj dokumentado pri la monda lingvo-problemo. Ankaŭ la mondo bezonas tian centron. Tia centro povas servi samtempe al Esperanto kaj al la homaro. Ĝi estos donaco al la mondo fare de la Esperanto-movado; ĝi samtempe estos unu el la plej utilaj helpiloj por la movado mem. Ĝi laboros kun organizoj, kiuj

havas pli specialajn celojn (ekz. ILUS).

La ĉefaj celoj de CED en la estonteco estu:

(1) Pliigi kaj vastigi la scion pri lingvaj problemoj, kiuj ekzistas ĉe la internacia nivelo.

(2) Pliigi kaj vastigi la scion pri ĉiaj eventualaj metodoj por solvi tiujn problemojn.

(3) Pliigi kaj vastigi la scion pri ĉiuj aspektoj de Esperanto.

(4) Plialtiĝi la nivelon de eksperteco pri la ĉi-supraj kernaj kampoj ĉe kiel eble plej multaj membroj de la Esperanto-movado.

(5) Helpi al la organizoj kaj membroj de la Esperanto-movado akiri sciojn en ĉiuj aliaj kampoj rilataj al ilia movada laboro.

Tiuj kvin celoj apartenas prave al unu organizo. Ili ne estas facile disigeblaj. Por atingi 2, necesas havi 1 kaj 3. Por atingi 1, 2 kaj 3, necesas havi 4. Sed por havi homojn, sur kiuj oni aplikus 4, oni devas utiligi 5. Krome, organizo kun tiuj kvin celoj estas pli homogena, ol oni eble supozus. La unuiga elemento estas scio. Homoj kapablaj por akiri sciojn de unu gneco estas ofte kapablaj por akiri sciojn aliajn. Homoj okupiĝantaj pri scioj (ekz. sciencistoj) ĝenerale komunikigas bone inter si. Teknikaj progresoj kaj la ekesto de novaj problemoj kaŭzas, ke unu fako ŝajne for de la kerno (ekz. elektroniko) povas subite fariĝi kerneca. Du fakoj ŝajne nerilataj povas subite kunigendiĝi por solvi iun problemon. La metodoj por kolekti, retrovi, eldoni kaj komuniki sciojn, kaj la metodoj por trovi, listigi, eduki, reeduki, konsulti kaj kunlaborigi fakulojn, estas similaj trans fakaj limoj. Do ekzistas bonaj kialoj por kunigi sandome la kvin nomitajn celojn.


La rezulto estus, ke CED havus du vizaĝojn, kiel diris Renato Corsetti, sed ne fenditan personecon, lau la vortoj de Humphrey Tonkin. Vidate de la flanko de UEA, CED estus la loko, kie oni scias pri scio. UEA turnus sin al CED por kaj kernaj kaj rilataj scioj. CED samtempe agus interne de UEA por levi la scinivelon de ties membroj, lau celo 4. Vidate de ekstere, CED havus ĉefe nur la unuajn 3 celojn, de kiuj la 3-a estus logike parto de la 2-a. La mondo venus al CED por ricevi informojn kaj konsilojn pri lingvoproblemoj kaj eblaj solvoj, inkluzive de Esperanto. (Nun oni iras, ekz., al la Fonduso Ford, t.e. tien, kie estas ekspertoj.) Sekve de ĝia agado por celo 4, CED estus en pozicio por provizi fakulojn en tiuj kampoj laŭpete. CED registrus kaj organizus la fakajn laborfortojn de la Esperanto-movado por ĝervoj interne kaj ekstere de la movado. La plej granda valorajo de CED ne estus iu arkivo de eltrancaĵoj en la Centra Oficejo, sed trezoro de vivantaj, talentaj, sciplenaj, lernemaj, adaptigemaj kaj kunlaboremaj homoj, disaj tra la mondo sed rapide mobilizeblaj. Plej grave, tiuj homoj ne nur atendus inform- kaj helpetojn de la centro; ili mem iniciatus diversajn projektojn, intersanĝus siajn spertojn, sendus siajn raportojn al fakrevuoj kaj partoprenus la vivon en fakaj medioj.

Prononcoj pri la efektiveco

Tiel aperu CED en la estonteco. Kiel ĝi funkciu kaj kion ĝi faru? Al tiuj demandoj mi povas respondojn nur sugesti, ĉar la nova CED mem devos fari la detalajn decidojn. Jen miaj sugestoj:

1. Kiel CED estu regata? Neniu altnivela scienca institucio povas daŭre teni altan kvaliton, se ĝin regas unu sola persono. CED ne estas escepta kazo. CED havu regan strukturon, kiu respegulas plurecon de celoj, de fakoj kaj de landoj, kaj multecon de personoj partoprenantaj ĝian agadaron. Krome, scienca institucio ne povas esti altnivela, se fakaj kvalifikoj ludas nenian rolon en ĝia gvidado. CED do bezonas statuton, laŭ kiu la politikaj organoj de UEA havas rolon konvenan al la granda apogo, kiun UEA donas al CED, sed ankaŭ la science kvalifikitaj personoj, kiuj estas kapablaj por juĝi la kvaliton de la laboro de CED, havas rolon konvenan al la nepra graveco de tiu kvalito. Science bazita reŝtруктуро ankaŭ faciligos la akiron de eksteraĵ subvencioj.

Ekzistas diversaj strukturoj kapablaj por plenumi tiujn kondiĉojn, sed mi donu unu ekzemplon. CED povus havi la jenan reŝtруктуроn:



(Sagoj indikas, ke la unu elektas la alian.)
(Strek-sagoj indikas la rajton, kandidatigi.)

La definitivajn decidojn de CED farus ĝia Estraro, kiu havus 3 membrojn. Unu membron elektus la Estraro de UEA, alian membron elektus la Scienca Konsilantaro de CED, kaj tiuj du membroj interkonsente elektus la trian membron. La Estraro havus deĵorperiodon de 3 jaroj. Deĵorantaj aŭ deĵorintaj estraranoj povus reestraranigi.

La plej gravajn decidojn farus la Estraro konsultante la Sciencan Konsilantaron. Tiu havus 15 membrojn. Ĉiu membro havus deĵorperiodon de 6 jaroj kaj povus deĵori maksimume 2 fojojn. Ĉiun duan jaron, la Scienca Konsilantaro anstataŭigus (resp. reelektus) 5 el siaj membroj. Por tiuj elektoj, ankaŭ estraranoj de UEA, estraranoj de CED kaj korespondantoj de CED rajtus surbalotiligi kandidatojn. La Scienca Konsilantaro elektus unu el la estraranoj de CED. Unuopaj sciencaj konsilantoj donus konsilojn al la Estraro laŭpete kaj meminitate.

Adekvatan konsultigon kaj kunordigon kun diversaj regionoj, landoj, fakoj kaj organizoj garantius la Internacia Komitato de Korespondantoj. La Estraro elektus kaj malelektus korespondantojn laŭ sia bontrovo. CED versajne atingus

ekvilibre ĉ. 100 korespondantojn, sed la nombro ne havus limon. Ĉiuj korespondantoj ricevas certajn informojn de la Estraro kaj rajtus proponi kandidatojn por la Scienca Konsilantaro. La ĉefa tasko de ĉiu korespondanto estus aĝi kiel kontaktulo inter CED kaj io alia, ekzemple grupo de kunlaborantoj, alia esplorcentro, scienca organizo aŭ la sciencistoj de iu fako aŭ lando.

La Estraro de CED nomus la unuopajn postenulojn, kun kiuj ĝi ankaŭ interkonsente fiksus ties deĵorperiodojn kaj laborkondiĉojn. Ili inkluzivus la Administranton de CED, kiu respondecus pri la ĉiutaga funkciado de la CED-oficejo, la Redaktoron de LMLP kaj eventualajn aliajn. Kiom ajn oni bezonus konstantan aŭ nekonstantan komitaton, la Estraro aŭ nomus ĝiajn membrojn aŭ komisius ties nomigon al iu.

La kroman internan strukturon de CED fiksadus ĝia Estraro, konsultige kun la Scienca Konsilantaro. Sed organizaj dividoj en "fakojn" estus, laŭ mi, eraro. La granda bezono estas ne de strukturiteco, sed de fluideco. Pli da homoj bezonas elfakigon ol enfakigon.

2. Kiel CED estu financata? La laboro de CED estos plenumbla malpli multkoste, ol egala laboro preskaŭ ie ajn alie, ĉar CED disponos pri multaj volontuloj. Tamen mono estos evidente necesa. Grandparte, la mono devos veni de diversaj fontoj de scienca subvencio; la scioj pri kiel havigi tian monon estas nur unu ero en la listo de scioj, kiujn CED devos flegi. Sed eĉ por serĉi tian monon, kaj por funkciigi esencajn servojn kiam ĝi mankas, kaj por fari eksterne nesubvenciatajn servojn por UEA, CED bezonos regulan provizon de mono. Tiu mono devos venadi de UEA, pro pluraj jam klaraj kialoj. Ĉefa inter tiuj estas la fakto, ke CED estos nemalhavebla ilo por la ĉiutaga laboro de UEA. Krome, UEA povos konscii, anogante la laboron de CED, ke UEA ne ignoras, sed bone plenumas, sian parton de la respondeco pri fundamenta esplorado pri la lingva situacio. Kaj fine, la ligiteco de CED al UEA estus malavantaĝa, se UEA ne sporigas CED. Homoj laborantaj en la interlingvistiko kaj aliaj fakoj povus ĝenerale eĉ pli facile ricevi subvenciojn por tio, se ili havus neniajn ligojn kun starnpunkthava organizo kiel UEA.

CED bezonas grandparte sendependan finncan reĝimon, por sekurigi sciencan objektivon kaj permesi al la gvidantoj de CED maksimume utiligi sian organizan ŝagcon. Ĉiujere UEA disponigus al CED sumon da mono por ĝia laboro. Tiu sumo inkluzivus la eventualan subvencion al LMLP. CED dum la jaro sendepende decidus pri sia buĝeto kaj utiligus la monon. Fine de la jaro, CED raportus al UEA pri siaj agadoj, siaj enspezoj kaj siaj elspezoj. UEA kontroligus la kontlibrojn de CED. UEA do decidus, kiom da mono CED meritas kiel subvencion, sed CED decidus, kiel utiligi tion. Tiu libereco instigus CED al maksimuma ekonomia efikeco. Ĉar se, ekzemple, ĝi trovus manieron por ŝpari monon ĉe la presado de LMLP, ĝi havus pli da rimedoj por diversaj aliaj projektoj.

Kvankam UEA fiksus la subvencion, estus avantaĝe por ambaŭ organizoj, ke la grandeco de la subvencio ne variadu ĉiujere per arbitraj ŝvingoj, kiuj ne rilatas al la sukcesoj de CED. Unu utila principo estus, ke la subvencio estu iu procentaĵo de

membrokotiĝoj kaj donacoj, kiujn UEA ricevis en la antaŭa jaro. Tio certigus, ke UEA sentu la subvencion kiel proksimume gualan ŝarĝon de jaro al jaro. Tio ankaŭ memorigus al CED, ke ĝiaj rimodoj dependas de la sukceso de UEA. La subvencia formulo motivigus la gvidantojn de CED, utiligi sian aparaton kaj siajn sciojn por la bono de UEA. Lau la ĝisnuna praktiko, daŭrigo de la subvencia nivelo rezultus, se oni principe disponigus al CED 10% de la kotizaj kaj donacaj enspezoj. Por organizo, kiu celas solvi komplikajn problemojn per nova maniero, tiu estas normala aŭ eĉ subnormala proporcio por la esplorbuĝeto. La nuna sistemo de financado estas abandoninda pro du kialoj. Unue, la havebla subvencio dependas de la grandeco de la ĉiujara Universala Kongreso de Esperanto. Ke la esplorbuĝeto variadu lau la kontinento, sur kiu oni laste okazigis la Esperanto-kongreson, simple ne havas sencon. Due, la konto, de kiu nun venas la mono por CED (inkluzive de INLP), nomigas la "Propaganda Konto". Estas rekte malutile, ke konto kun tiu nomo estu la ĉefa fonto de daŭra subvencio por institucio, kies scienca objektiveco estos neeviteble suspektata jam de la komenco.

3. Kiaj estu la rilatoj de CED kun aliaj organizoj kaj unuopuloj? CED devas flegadi bonajn rilatojn kun ĝeneralaj kaj fakaj Esperanto-organizoj kaj kun sciencaj institucioj kaj unuopaj sciencistoj tra la mondo. Filieco, korespondanteco, konsultaj rilatoj kaj komitataneco--en ambaŭ direktoj--estas kelkaj el la ligiloj en la eventuala repertuaro. La sugestita registruro permesus proksimajn rilatojn en la kadro de la Scienca Konsilantaro kaj la Internacia Komitato de Korespondantoj. Oni povas esperi kaj atendi, ke eble triono de la Konsilantaro kaj kelkdeko de la korespondantoj estos neesperantistoj, kies eksperteco kaj kontaktoj povos esti utilaj al CED. Krom tio, CED devas instigi la membrojn de UEA aligi al kaj aktivigi en ĉiuj organizoj, precipe tiuj, kiuj reprezentas la fakojn rekte tusantajn la lingvoproblemon. CED per tiaj rilatoj ankaŭ helpas interkontaktigi personojn kaj organizojn kun antaŭe nekonitajn komunecojn de intereso.

4. Kiel CED atingu celon 1? La ĉefa rekomendo estas, ke CED daŭrigu la eldonadon de LMLP. Tiu revuo jam pruvis sian utilecon kaj daŭre kontribuas al niaj scioj pri lingvaj problemoj. Artikoloj en LMLP ne nur venas de eminentaj sciencistoj (ekz. Joshua A. Fishman), sed ankaŭ citiĝas poste en artikoloj de aliaj eminentuloj (ekz. Dell Hymes, Stanley Lieberman). Krome, LMLP akiras ankaŭ pli da altkvalitaj kontribuoj en la estonteco, parte ĉar oni verkas en la kernaj fakoj multe pli abunde nun, ol la ekzistantaj revuoj povas ensorbi materialon. Revuoj kiel la Internacia revuo de aplika lingvistiko kaj la Internacia revuo de la sociologio de lingvo nun envicigas akceptitajn artikolojn dum proksimume 3 jaroj, antaŭ ol ili aperas. La merkato klare favoras tian revuon, kia LMLP. Se CED ne povos plibonigi la financajn kondiĉojn de preĝado en Nederlando kaj eldonado ĉe Mouton, ĝi konsideru sangigon de la pres-kaj/au eldonejo. Ĝi laboru por pligrandigi la abonantaron, kunredaktaron, juĝantaron kaj kontribuantaron. CED povus helpi al alia nuna periodaĵo, Interlingvistika informaservo, etendi sian enhavon kaj aperigi diverslingvajn eldonojn.

Kroma eblaĵo estus serio de Studoj de CED, kiel proponis Detlev Blanke. Ili povus konsisti el esplorraportoj, kiuj estas tro ampleksaj por IMLP. Ili aperus neregule. Aliflanke, komentoj de Victor Sadler kaj Carlo Minnaja memorigas nin, ke oni atingos pli vastan kaj gravan legantaron, se oni akceptigos iun studon en fakrevuo aŭ libro eldonota ne de CED mem.

Alia ideo, de David Jordan, estas la eldonado de ĉiujara faktlibro pri la monda lingvo-problemo. Ĝi inkluzivus statistikojn, kronikon de la epizodaj lingvo-problemoj de la lasta jaro kaj unu aŭ pli da interpretaj aŭ analizaj raportoj. Ĝi aperus plurlingve kaj ĝelus ĉefe konsultsekciojn de bibliotekoj, kiuj abonus ĝin kiel serion.

CED devus flegi la fakajn kvaliton ne nur per eldonaĵoj, sed ankaŭ per faciligi personajn kontaktojn inter homoj, kiuj povas de tio profitigi sian laboron. CED-kunvenoj ĉam ĉiu UK, proponitaj de Detlev Blanke, estas natura eblaĵo; ili povus inkluzivi specialajn kunsidojn de la korespondantoj kaj de la Scienca Kongilantaro. CED devus serĉi subvenciojn, foje kolege kun aliaj aŭspicintoj, por fakaj konferencoj pri aspektoj de la lingvoproblemo.

Por ambaŭ sferoj, tiu de dokument-dissemado kaj tiu de persona kontaktigado, CED bezonos daŭre funkciantan sistemon de informado kaj komunikado, versajne sur bazo de masinlegebla dosieraro. Scioj, kiel Jerzy Ŭspieński notis, estas ofte neutilaj, se ili ne estas sufiĉe rapide troveblaj. Do celo 1 de CED vere estus ne nur pliricigi la trezoron de scioj, sed ankaŭ plialirebligi ĝin. Scioj devas esti rapide kaj malmultkoste troveblaj. Tio inkluzivas bibliografiajn, biografiajn kaj faktajn sciojn. CED ĉi-rilate ĝuos nekutilman avantaĝon inter sciencaj centroj: ĝi povos komuniki kun siaj kontaktatoj en kelkdeko da lingvoj, per siaj tutmondaj kunlaboraĵoj. CED ne kripligos sin per la aroĝema, sed ofta supozo, ke ĉiuj komunkinduloj scipovas certan lingvon. CED tiel atingos mediojn, kiujn pli elitismaj institucioj kutime ignoras.

Avertendaĝas, ke novaj daŭrprojektoj, kiel lingvoproblema jarraporto aŭ bibliografia servo, postulas seriozan antaŭplanadon. Oni entreprenu tiajn novajn projektojn nur kiam ili estas maturaj. Dokumentado povas facile ensorbi la tutan buĝeton. La Internacia centro de esploro pri la dulingveco, ekzemple, jam elspezis milionojn da guldenoj kaj laborigis dekojn da homoj, dokumentante la distribuon de dulingveco en la mondo. Oni devas zorge fiksi la limojn kaj kalkuli la kostojn. Kiel Ivo Lapenna rimarkigis, oni devas ankaŭ esti certa pri la efektiva laboronteco, ne nur la intencoj, de la kunlabora stabo.

5. Kiel atingi celon 2? IMLP nature kontribuos al la scio pri diversaj metodoj por interveni en lingvajn problemsituaciojn. CED povus utile havi korespondantojn de diversaj organizoj, kiuj okupiĝas pri solvoj de lingvaj problemoj (ekz. tradukado, bildsignoj, terminologia normigado, lernado de lingvoj). Ĉni povus kunlabore formuli esplorprojektojn, kiuj kompare analizus diversajn problemsolvojn sub diversaj kondiĉoj. Hans Bakker foje eklaboris pri tiu temo. Oni pli probable akirus subvencion por tio ol por unusolva, nekunlabora projekto. Rilatoj kun interlingvistoj kaj ties organizoj (ekz. CDELI kaj la laborgrupo en Moskvo gvidata de M.I. Isaev) estas simile flegendaj. Krone,

estus bone, ke CED aŭspiciu la Novajleteron por interlingvistoj kaj subvenciu Fokuson.

6. Kiel atingi celon 3? Paradoxse, la esperantologio lastatempe preskaŭ ekziliĝis de Esperantujo. Post la malapero de Esperantologio kaj la apero de L'ILP, kiun oni ne volis tro esperantistigi, la esperantologoj ne havas eĉ minimume kontentigajn laborokondiĉojn. CED devas sangi tion. Revivigo de Esperantologio, kiel proponis foje Richard E. Wood kaj nun Detlev Blanke, versajne en malpli luksiga formato, estas unu eblo. La laboro pri la Enciklopedio de Esperanto devus pluri sub CED, sed tio tute ne sufiĉas kiel esprimilo de la esperantologio. La problemo havas fundamentan gravecon. La esperantologoj devas senti, ke ili havas organizitan centron de informigo kaj apogo. Tiu centro estu CED.

7. Kiel atingi celon 4? Por pliekspertigi la membrojn de la movado, CED bezonas la kunlaboron de ties gvidantaro, ankaŭ ĉe nacia kaj loka niveloj. Temas ne nur pri edukado per la E-gazetaro, okazigo de seminarioj sub ISU ktp, sed ankaŭ pri instigoj, ke anoj sendepende gajnu sciojn pri lingvaj problemoj kaj solvoj. La fakto estas, ke oni povas esti sukcesa fakulo, sen ke la fakto estu onia profesio. Unu el la plej influaj lingvistoj ĝis nun, Benjamin Lee Whorf, estis inspektisto por asekurkompanio. CED devas konvinki la movadon, ke ili povas akiri jamajn kaj mem malkovri novajn sciojn, eĉ se ili ne estas edukitaj kiel sciencistoj. La necesaj informoj kaj metodoj estas haveblaj. Por akiri ilin oni bezonas temon, laboron, inteligentecon kaj entuziasmon--samkiel por esti sukcesa movada aktivulo. Ĝis nun nur TEJO, per siaj seminarioj, montris komprenon pri tiu fakto. Por faciligi la aliron al la necesaj scioj, CED devus fiksi ĉe siaj eldonaĵoj, inkluzive de L'ILP, speciale favorajn prezojn por membroj de UEA.

Krom tio, CED devas konsciigi la membraron--precipe la junan membraron, evidente--pri la ebleco, adopti unu el la kernaj fakoj kiel profesion. Surprizas, kiom malmultaj esperantistoj profesie okupiĝas pri iu ajn el la t.n. lingvaj sciencoj. Kiel jam indikite, ili eble emas eĉ eviti Esperanto-proksimajn fakojn dum la studado, aŭ pro naiva simplismo aŭ pro sentoj de malsupereco aŭ malsekureco, kiuj nature estiĝas kiam oni disputas kiel membro de eta samojniano. Sed tio ne necesas. Kontraŭe, se lingvistoj ne venas al Esperanto, esperantistoj povas iri en lingvistikon. CED devas tiurilate labori ne per premo, sed levante la kontraŭpremon, kiu almenaŭ psiĉe versajne jam ekzistas. CED devas montri, ke Esperanto-tusantaj fakoj estas tute legitimaj kaj eĉ tre utilaj profesioj por esperantistoj, kies fruaj interesigo kaj entuziasmo povas esti la bazo por nekutime sukcesaj profesiaj karieroj. Lastatempaj spertoj ankaŭ montris, ke kiam fakuloj renkontas esperantistojn, kiuj vere scias, pri tio ili parolas, la fakuloj ofte ekmontras novan, bonvenigan interesigon pri la temo Esperanto.

Fine, CED povas pozitive influi la specojn de homoj, kiuj aliĝas al kaj restas en la Esperanto-movado. Certagrade la movado ja havas "du kulturojn", tiun de la hobiisto kaj tiun de la seriozulo. Ofte seriozaj personoj forlasas la movadon

post mallonga ekkono, ĉar ĝin ŝajnas tro penetri kulturo naive hobiisma au eterne komencanteca. Kontraŭ tiu tute komprenebla sed tre malutila perdado CED povas agi. Ĝi povas servi kiel centro de unu el la subkulturoj, en kiu homoj aparte edukitaj, spertaj au respondecaj, dezirantaj kaj povantaj serioze okupiĝi pri au helpi al Esperanto, sentos sin komfortaj kaj trovos aliajn, kun kiuj ili interkompreniĝas.

8. Kiel atingi celon 5? La delegita reto de UEA estas bona komenco por sistemo de ĉiufakaj kunlaborantoj. W. de Smet kompilis liston de plurcent sciencistoj, kiuj scipovas Esperanton. CED konstruu sur tiuj bazoj sistemon de fakul-registrado. Kiam mankos la necesaj scioj, CED devos peti, ke iu kunlaboranto aparte informigu pri iu problemo. La membroj de UEA kaj aliaj simpatiantoj povas utile labori en la kadro de CED ankaŭ se ili ne apartenas al la kernaj fakoj; ili devas klare kompreni tion. La Jarlibro de UEA montras, ke la movado teorie disponas pri grandega kaj diversega stoko de alte kvalifikita laborforto. Manko de organizo ofte kondukas al la praktiko, daŭre peti al la samaj homoj fari novajn taskojn, ĝis ili estas supersargitaj. CED devas pritrakti metodojn por plivastigi la efektivan reton de disponebla talento.

9. Kio okazu al la agadoj, kiujn CED faris ĝis nun? Pri LALP kaj la Enciklopedio mi jam parolis. La ĉefe alia agado estis la rutina dokumentado pri la Esperanto-movado. Estus preferinde, ke UEA mem faru tion. UEA havas kontaktojn kun la fontoj de la informoj (ekz. eldonejoj), kaj pluraj el la aferoj dokumentataj (ekz. ISU) estas agadoj de UEA mem. UEA ĉiam pli bone faros aferojn, kiuj postulas regulan ritmon, ol CED. Krome, decidoj pri kio estu dokumentata rilatas proksime al decidoj pri informado, kiu nete apartenas al UEA anstataŭ CED. (Reagoj ricevitaj ĝis nun ankaŭ ĝenerale kontraŭas la kalkfolian eldonformaton de la CED-Dokumentoj. Jarraporto pri la Esperanto-movado estus versajne pli efika.)

Estus tamen tute konvene, ke CED konsiladu al UEA pri movada dokumentado kaj helpu trovi kvalifikitajn personojn por eklabori pri tio ce UEA. CED povus ankaŭ entrepreni apartajn dokumentajnprojektojn rilatajn al la Esperanto-movado, kiam tiuj estus valoraj sed ekster la rutina programo de UEA. Kaj fine, CED povus auspicii certajn rutinajn dokumentajn taskojn, ekz. bibliografiadon, se ĝi pli facile ol UEA akirus por tio eksterajn subvenciojn. Sed la spirito kaj efikeco de CED kiel vigla, memvidata organizo suferus, se oni komencus rigardi ĝin ĉefe kiel plenumanton de la konstantaj dokumentaj taskoj de UEA.

La transiro

Kiel CED moviĝu al la proponata formo? Unu el la eblaj transiraj procedoj estus la jenĝ: La Komitato kaj/au Estraro de UEA nomus du membrojn al inaugura Estraro de CED, post interkonsultigo kun science kvalifikitaj membroj de UEA. Tiu du nomus la trian. Tiu inaugura Estraro servus nur por unu jaro. Ĝi varbus 10 membrojn por la unua Scienca Konsilantaro.

Tiuj 10 elektus la aliajn 5 dum la jaro, kaj fine de la jaro oni elektus la unuan normalan Estraron. La inaugura Estraro ne limigus siajn agadojn per tio; ĝi havus kaj uzus la normalajn estrarajn potencojn, por ekplani la multflankan kaj multjaran agadprogramon de CED.

Nur la sperto montros, ĝuste kiom da laborfortoj CED povos mobilizi, ĝuste kiugrade CED sukcesos plialtigi la scinivelon de la membraro de UEA, ĝuste kiom da eksteraj monrimedoj CED povos trovi, do ĝuste kiel vastan kaj sukcesan programon de agadoj en kiuj kempoj CED iradigos. Mi ne povas fari pri tio promesojn au ec precizajn taksojn. Sed konsiderante la diversajn faktorojn, aparte la kvanton kaj kvaliton de junaj sciencistoj kaj profesiuloj en UEA lastatempe okupantaj sin profesie au profesiece pri temoj tusanataj la proponatan laboron de CED, mi havas grandan esperon pri ties rapida ekfloro kaj impona estonteco. Se UEA pretas investi adekvatajn rimedojn en CED kaj doni al ĝi la necesan liberecon, mi ne dubas, ke ĝi trovos ege kapablajn homojn por ekokupi la gvidlokojn de ĝia reŝtukturo, kaj ke ili siavice mobilizos multe pli vastan kaj originalan disfloron de scienca aktivado, ol la Esperanto-movado iam spertis.

Konkludo

UEA havas grandan bezonon pri diversaj sciĵoj. Por indiki proksimume kiom grandan, mi aldonas al ci tiu raportoj liston de kelkaj fakoj evidente kernaj al la kampo de UEA au proksime rilataj al la medioj de laboro por Esperanto. En la pasinteco, CED faris valoran laboron, kiu plejparte tamen apartenis esence al UEA; dume, preskau neniu organizo faris la laboron, kiu esence apartenis al CED. Nova generacio de science edukitaj esperantistoj jam montris sian kapablon, partopreni en la transpreno kaj reorganizado de CED por fari tiun laboron. La laboro estas necesa kaj la tempo estas matura. Scio estas potenco!

Aldono

Kelkaj fakoj, pri kiuj UEA bezonas ekspertojn

esperantologio	leksikografio
interlingvistiko	terminologio
lingvoplanado	normscienco
lingvopolitiko	bibliografia scienco
sociolingvistiko	bibliotekscienco
psikolingvistiko	edukado pri internaciaj aferoj
dulingvoco	pedagogio
plurlingvoco	eduka politiko
dulingva edukado	landa politiko
lingvo-instruado	esplormetodologio
lingvistiko	financado de scienco
komputa lingvistiko	financado de organizoj
informatiko	stata subvencio
lingva filozofio	donac-varbado
komunikado	imposta juro
internacia komunikado	ner-brovarbado
internaciaj rilatoj	socialaj movadoj
internacia politiko	publikaj rilatoj
diplomatio	reklamado
internacia juro	verkado
internaciaj organizoj	ĵurnalismo
Unuiĝintaj Nacioj	redakto
pac-scienco	eldonado
internacia komerco	librovendado
internacia turismo	amasmedoj
bazaj fakoj	presado
etnaj rilatoj	librotendado
etnismo	administrata aŭtomatigado
naciismo	administrado
kompata literaturo	kongres-organizado
literaturo	konferonc-organizado